



# PENSEO

*N-ro 108*  
*OKT./2000*

**Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 [www.crosswinds.net/~zfmao/penseo](http://www.crosswinds.net/~zfmao/penseo)

## MIKRONOVELO

### Okuloj

Chen Jianjiang



Estis kvin-jara knabino, kies okuloj fariĝis blindaj pro malsano. Kiam ŝi plenkreskis, viro edzinigis ŝin

La viro estis bonkora. Li ne nur zorgis pri la hejmaj aferoj sen ŝia helpo, sed ankaŭ ŝin flegis zorgeme. Poste ŝi naskis fileton dikan kaj pezetan. Ambaŭ tiu kaj ŝi falis en la zorgon de la viro. Antaŭe, estinte junaspekta, li nun surhavis maljunan mienon.

La blinda virino treege emociiĝis. Kelkfoje, kiam ili troviĝis sur la lito, ŝi karesis la larĝan vizaĝkonturon de sia edzo, dirante, “Vi estas vere bonkora. Kiel mi dezirus malfermi miajn okulojn por vidi vin! Kondiĉe, ke mi nur povus vin vidi momenteton, mi ankore kontentiĝus, eĉ se mi tuĵ mortus.” Kaj ŝi senĉese forviŝis larmerojn.

La edzo eksentis simpatian al ŝi. Li alpremis ŝin al sia sino kaj brakumis ŝin firme. Li konsolis, “Ne ploru. Morgaŭ mi irigos vin al grandaj urboj kiaj Nankino kaj Ŝanhajo por peti kuracistojn resanigi viajn okulojn, eĉ se tio kostos mian tutan posedaĵon.”

Ververe, ŝiaj okuloj povis revidiĝi. Kiam ŝi malfermis siajn okulojn, ŝi ĉirkaŭprenis per ili la tute novan vidaĵon. Ŝi ŝtoniĝis. Ŝi eĉ ne respondis al la vokoj de la edzo kaj filo apude starantaj.

La viro emociiĝis ĝis la ekstremo kaj etendis siajn brakojn por ĉirkaŭpreni ŝin. Sed ŝi forte forpuŝis lin kaj diris malice, “Kion vi volas fari!”

“Tamen mi estas via edzo!” li replikis.

“Ne, mi ne konas vin!” ŝi larĝigis siajn okulojn...

Vespere la virino fermis siajn okulojn, prenis la kapon kaj zorgeme palpis ĝian konturon. Post tio, ŝi anoncis, “Estas vi. Enlitiĝu.”

La virino ĉirkaŭprenis la filon kaj ili ambaŭ sin turnis en la sinon de la viro. Kun leĝera anhelado, ŝi diris, “Tiel mi sentas certecon.” — Se per miaj okuloj, mi ne kuraĝas rekoni vin.

(el la ĉina: Hongjia)

## ĈINAJ MODERNAJ POEMOJ



### Jasmeno

Xi Murong



jasmeno ŝajne  
spitante ĉiajn sezonojn  
ĉu tage aŭ ennokte  
presentas kelkatempe siajn etajn  
aromajn florburĝonojn

sopiro al vi

ŝajne en la sama maniero  
 ĉu tage aŭ ennokte  
 ekzistas en ĉiu  
 tranca pensero

## Krimo

### Gu Cheng

nigra nokto  
 kiel grup' kaj grupo  
 da maskitaj homoj  
 proksimiĝas al mi ŝtele  
 frustras  
 kaj foriras  
 mi la sonĝon perdas  
 la moneroj senvaloraj restas en miaj  
 poŝoj  
 “estas mi rabita”  
 al la sun' mi diras  
 nigran nokton pelas jen ĝi  
 tamen grup' da nigraj noktoj  
 ĝin postĉasas



(el la ĉina: Fang)



## EL «LAŬZI»

Trad. Wang Chongfang

### ĈAPITRO IV

La Taŭo estas malplena, kiel vazo,  
 Sed uzate ĝi neniam pleniĝas.  
 Senfunde profunda,  
 Ĝi estas kvazaŭ la rapatro de la miriadoj da  
 estaĵoj.  
 Ĝi malakrigas ĉion, kio estas akra;  
 Ĝi malkonfuzas ĉion, kio estas konfuza;  
 Ĝi malbriligas ĉion, kio estas brila;  
 Ĝi mksiĝas kun ĉio, kio estas polva.

Tute senforma,  
 Ĝi ŝajnas ne ekzisti kaj tamen ekzistas.  
 Mi ne scias, de kio ĝi naskiĝis,  
 Sed ŝajnas, ke ĝi ekestis jam antaŭ ol la Sinjoro de  
 la Ĉielo.

### ĈAPITRO V

La Ĉielo kaj la Tero ne estas favoraj;  
 Ili rigardas ĉiujn estaĵojn egale kiel pajlohundojn.  
 Inter la Ĉielo kaj la Tero,  
 Ĉu la spacego ne similas balgoblovilon?  
 Ĝi estas malplena, tamen ĝi ne elĉerpiĝas;  
 Ju pli ĝi estas laborigata, des pli da blovoj ĝi donas.  
 Tro da parloj rapide kondukas al bedaŭrinda fino,  
 Do estas preferinde teni sin je la modereco.

### ĈAPITRO VI

La Spirito de la Valo neniam mortas.  
 Ĝi estas nomata la Mistera Femalo.  
 La pordo de la Mistera Femalo  
 Estas la radiko de la Ĉielo kaj la Tero.  
 Ĝi senforme ekzistas,  
 Sed ĝia utilo neniam elĉerpiĝas.

♀♀♀      ♀♀♀      ♀♀♀

Poemo de Du Fu

⊙ ⊙ ⊙ ⊙ ⊙ ⊙ ⊙ ⊙

### Tranoktado en Milita Tendo

Ĉe puto platano sin trovas en frosto  
 sub freŝe aŭtuna ĉielo.  
 Mi sola tranoktas en tendo de Jiangcheng  
 kun flame kaduka kandelo.  
 Korn-sono trafendas la nokton, kvazaŭe  
 dirante al si mem mizere.  
 Zenite la luno aspektas pitoreska,  
 sed kiu ĝin aprecas sincere?  
 En longa tempdaŭro leteroj elhejmaj  
 neniam atingas, neniam.  
 Laŭ hejmira voj' min atendas pasejoj  
 dezertaj, danĝeraj, defiaj.

Dek jarojn mi migradas ,suferas tro multe  
 en tagoj tragikaj sennombraj.  
 Finfine jen kiel birdeto kaŝvivu  
 surbranĉe en pensoj mi sombraj.

(trad. Vejdo)

◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇

## Ĉina Fablo

◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇

### Kajto Kaj Aglo

Shao Hua

Vento ekblovas.

Kajto demandas al Aglo, “Kien vi iras nun?”

Aglo respondas, “Mi volas pafi min kontraŭ  
 la ŝtormo, flugi tra la nigraj nuboj, stiri la bruan  
 tondron kaj lukti kun la fulmo. Kaj vi?”

Kajto diras, “Mi deziras flosi laŭ la vento. Ĝi  
 karesu mian brilan kostumon kaj flirtigu mian  
 belan voston. Ĝia magia forto sendu min al la  
 Naŭa Ĉielo, tiel ke la surteraj popolanoj povas  
 apreci mian altiran figuron kaj admiri mian  
 allogajn movojn dancantajn jen supren jen  
 malsupren.”


Ili disiĝas en malsamaj direktoj.

Post la ŝtormo, Aglo havas pli fortikajn  
 flugilojn kaj pli akran vidon. Li ŝvebas sur la blua  
 serena firmamento.

Dume, Kajto, kun kelkaj bambuaj ripoj, falas  
 kaj pendas sur arbo staranta sur la terpeco kun  
 malordaj tomboj.



(el la ĉina: Dura)



### Profundan kondolencon al s-ano Jariĉ

Kvankam s-ano Jariĉ forpasis pli ol unu jaron, la  
 kondolencaj artikoloj kaj leteroj senĉese alfluis.  
 La jena letero skribita de s-ano Otto, intima  
 amiko de Jariĉ, esprimas lian profundajn senton  
 kaj rememoron. Nun ni aperigas ĝin por danki  
 lin unuflanke kaj por kondolenci nian karan  
 s-ano Jariĉ aliflanke.

redakcio

### Ĝui Printempan Feston en Wuhan

Otto Nitsche (Germanio)

Mia revo realiĝis gastu la duan fojon en Ĉinio.  
 Favoris min la 10-jara datreveno de urbaj ĝemeliĝoj  
 inter Wuhan kaj Duisburg. Por mi estis unika  
 bonŝanco akcepti la invitojn de Jariĉ kun  
 samideanoj.krome de s-ro Lu Binsheng — li estas  
 redaktoro de EPC — ĉeesti Printempan Feston. Ĝi  
 datiĝas laŭ lunkalendaro. Unue ni interkonsentis  
 daton de mia fora vojaĝo. Ĝi estis de la 30-a Januaro  
 ĝis la 19-a Februaro 1992.

Post havigo de vizo kaj flugbileto  
 Frankfurt-Beijing kaj reen stariĝis problemoj. Ne  
 eblis ricevi flugbileton de Beijing al Wuhan. Kion  
 fari? Danke al mia amiko Lu kaj pliaj redaktoroj oni  
 finfine sukcesis havigi necesan flugbileton al  
 Wuhan. (monaj devizoj estis kolektitaj de EPC  
 redaktoroj). Post 4-taga restado en Beijing mi  
 daŭrigis mian vojaĝon. En Beijing estis sunriĉaj  
 tagoj kun frosto -10 gradojn. Je la 3-a Februaro ĉina  
 flugkompanio CAAC tagmeze surteriĝis. Ho, kia  
 akcepto! Ne nur tuta familio de Jariĉ kun Wuhan  
 samideanoj kore akceptis min, sed ankaŭ terura  
 pluvo, kvazaŭ la akvo estus verŝata per siteloj,  
 bonvenigis min. Per aŭto trapasante preskaŭ  
 senhomajn stratojn plenajn de flakoj ni seke atingis  
 loĝkvartalon de Jariĉ. La unua impresoj estis  
 malbona, mi sentis. Kaŭzo de pluvo kaj ne tagiĝo


ŝajnis al mi ke ĉio aspektis griza, ankaŭ la sesetaĝa domo “estu kore bonvena en nia triĉambra loĝejo! Sentu vin kiel hejme, mia kara germana amiko Otto”. Jen koraj vortoj dediĉita al mi. Ho, vere estis malvarma en la ĉambroj. Jariĉ petis, ke mi ne demetu miajn jakon kaj lanan ĉapon, por ke mi restu varma. Mi tuj estis regalita per varmega bongusta teo, kaj poste mi rigardis la ĉambrojn kaj etan kuirejon. Oni pretigis al mi dulitan ĉambron de la filino. Ŝi havis liton en loĝejo en loĝejo de najbaro. Malrapide mi kutimiĝis al la vivo de ĉinoj, mi vere bonfartis pro bonega prizorgo de la dommastrino, de Jariĉ k.eĉ la gefiloj. Jariĉ informis, ke nur post semajno mi havis eblecon translokiĝi al ĉambro kun hejtado. Mi vidu!

Ankoraŭ freŝa estis mia unua Wuhan vizito en Aŭgusto 86. Tiam mi fizike batalis kontraŭ "forna varmego". Multnombraj turistoj svarmis kiel abeloj de unu vidindaĵo al la alia. Ĉifoje stariĝis tute alia situacio. Ĉiuj hoteloj estis fermitaj kaj ŝajnis al mi, ke mi estis la sola gasto en la urbo, mi sentis, ke ĉefe infanoj interesiĝis pri tiu ĉi “longnazo” veninte el fora parto de la mondo. Mi ĝuadis tiujn momentojn dum urborigardo.

La 3-a Februaro 92 estis jarfina tago de Bovo (ĉu taŭro?) Jaro kaj mi havis unikan ŝancon samtage festis en tri familioj “Ĉinan Printempnan Feston”. Kiom da neforgeblaj impresoj restis por mi? Jariĉ, s-ro Zhang Danchen kaj fraŭlino Wana Xia akompanis min, mi bone memoris, al la domo de s-ro Hu Guozhu. En gaja, bonetosa societo mi spertis preparadon de multaj frandaĵoj. Oni preparis vaporumitajn kaj akre kuiritajn kuirajojn ne ĉiam laŭ gusto de Eŭropano. Abundis frandaĵoj el fiŝo, koko, anaso kaj viando. Mi gustumis arakidojn, la dolĉe farĉitajn bulojn kaj la famajn printempajn bulojn. Mi kun ĝojo lernis manipuli per manĝo bastonetoj. Kaj ni tostis per “rizo-brando” je bona Novjaro kaj sanstato. Tempo rapide pasis, kaj nur malfrue ni revenis al la hejmo de Jariĉ. Ho, la edzino grumblis pro malfruiĝo, tion mi sentis. Ni

pardonpetis. Proksimiĝis la jarŝanĝiĝo. Precize je meznokto estiĝis eksplodo de miloj da petardoj ĉie tra la urbo. Tutvive mi ne spertis tian tondran bruadon. Do, homoj havis grandan ĝojon, precize la infanoj. Laŭ antikveca kutimo estu forpelitaj misteraj fantomoj kaj diabloj. Germanoj eniras novjaron de la 31-a de Dec. al 1-a de Januaro, dum meznokto farante pireteknikaĵojn.

Je la 5-a Februaro eĉ varma sunbrilo bonvenigis “Jaron de Simio” kaj estis kroma festa tago. Jariĉ fariĝis 55-jara. Kaj mi estis lia gasto. Vico da gratulantoj estis longa. Gratulis najbaroj, du bofilinoj de Jariĉ kaj iamaj gelemintoj, s-ro Xu Zhengyun, krome s-ino Li Hanzheng — poste mi gastis en iliaj hejmoj. Kaj ni havis bonhumoran feston. Mi gratulis per “bondezira kanto” germanlingve. Multaj donacojn ankaŭ mi ricevis de la gratulgastoj, grandan manfaritan tablotukon mi donacis al s-ino Wan Difang — ĝi estas tipa bavaria manlaboro. (daŭrigota)



- \*\*\*\*\*
- Eldonas Guangdong-a Esperanto-Asocio  
Adreso: s-anino Harpina WU  
Poŝtkesto 136, Jichang-xi,  
Guangzhou, Ĉinio, CN-510403  
E-poŝto: [20harpina@21cn.com](mailto:20harpina@21cn.com)  
POŝT-KUPONOJ ESTAS BONVENAJ!

.....  
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)  
Adreso: Fremdlingva Fakultato, Shantou  
Universitato, Guangdong 515063, Ĉinio  
Tel: (0754) 2903012 (hejme)  
E-poŝto: [wyd168@21cn.com](mailto:wyd168@21cn.com)  
Ĉiujn kontribuajojn al la ĉefredaktoro.  
\*\*\*\*\*